

Heinrich Heine,
Vi estas al mi kiel floro

tradukita de Hein Wernik

Vi esta al mi kiel floro
Pro puro kaj bel' kaj graci',
Mi vidas vin, kaj en la koron
Kaŝiras la melankoli'.

Mi volus sur vin preĝe meti
La manojn, floranta juvel';
Ke gardu vin Dio pro via
Gracio kaj puro kaj bel'.

*Traduko de la Germana poemo "Du bist wie eine Blume" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de Hein Wernik en 1994.*

Arg-475-918 (2010-05-26 19:16:04)

*La adreso de s-ro Hein Wernik estas: Prinsenlaan 26,
NL-6542 TB Nijmegen, Nederlando.*

Heinrich Heine,
Vi estas tiel bela

tradukita de Manfred Ratislavo

Vi estas tiel bela
samkiel ĉarma flor';
vidante vin, doloron
mi sentas en la kor'.

Surmeti la manojn sur vian
kapeton inklina mi,
preĝante, ke ĉarma kaj bela
konservu vin ĉiam Di'.

*Traduko de la Germana poemo "Du bist wie eine Blume" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2001-09-20.*

MR-365-1 / Arg-475-917 (2008-07-15 12:10:51)